[1]

Esperanta-Germana Frazlibro de la ĉiutaga vivo.

Deutsche und Esperanto-Gespräche über Alltägliches.

Laŭ **R. Anton**
prilaboris **J. Borel**.

2ª eldono.

1908.

- **GERMANUJO** — ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, BERLIN S. 42
- **ANGLUJO** — THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, LONDON.
- **DANUJO** — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, KJÖBENHAVN.
- **FRANCUJO** — HACHETTE & Cie, PARIS.
- **HISPANUJO** — J. ESPASA, BARCELONA.
- **ITALUJO** — RAFFAELLO GIUSTI, LIVORNO.
- **POLUJO** — M. ARCT, WARSZAWA.
- **SVEDUJO** — ESPERANTO FÖRENING STOCKHOLM.

[2]

---

[3]

Enhavo.

Inhalt.

		Paĝo		
I.	Pri fremdaj lingvoj	5	I.	Fremd
II.	Salutoj kaj komplimentoj	8	II.	Begrüs
III.	Leviĝo	11	III.	Aufste
IV.	Kuŝiĝo	16	IV.	Zu Bet
V.	Vetero	17	V.	Wetter
VI.	Horo. Dato	21	VI.	Uhr. D
VII.	Malsaneco	22	VII.	Krankh
VIII.	Aĝo. Korpaj ecoj	25	VIII.	Alter. k
IX.	Sur la strato:		IX.	Auf de
	A. Demandado pri la vojo	27		A. Nac
	B. Renkonto	29		B. Beg
X.	En magazeno:		X.	Im Lad
	A. Cigarvendejo	31		A. Ziga
	B. Ĉapelvendejo	32		B. Hut
	C. Ĉe la ŝuisto	32		C. Bei
	D. En magazeno de gantoj kaj tolaĵoj	33		D. Im l
	E. Ĉe la tajloro	34		E. Bei
	F. Ĉe la horloĝisto	36		F. Bei
	G. En la magazeno de papero	38		G. In d

	H. En la librovendejo	39		H. In d
	I. Ĉe la kombisto	40		I. Beim
XI.	En la poŝtejo	42	XI.	Auf de
XII.	Vizito	44	XII.	Ein Be
XIII.	La manĝoj	49	XIII.	Die Ma
XIV.	En la restoracio	50	XIV.	Im Res
XV.	En la hotelo	53	XV.	Im Hot
XVI.	Ĉe la fervojo	55	XVI.	Auf de

---

[4]
[5]

I.
Pri fremdaj lingvoj.

I.
Fremde Sprachen.

Ĉu vi parolas esperante?

Sprechen Sie Esperanto?

Jes, Sinjoro, iom.

Ja, ein wenig.

Tamen ŝajnas al mi, ke vi tre bone scias Esperanton.

Es scheint mir jedoch so, als ob Sie sehr gut Esperanto könnten.

Mi nur scias tiom, kiom estas necesa por igi min komprenebla.

Ich kann gerade so viel, dass es mir möglich ist, mich verständlich zu machen.

Vi parolas tute bone.

Sie sprechen ganz gut.

Vi parolas tre flue.

Sie sprechen sehr geläufig.

Mi komprenas pli bone ol mi parolas.

Ich verstehe besser, als ich spreche.

Vi do komprenas ĉion, kion mi diras?

Sie verstehen also alles, was ich sage?

Preskaŭ ĉion. Sed se vi havus la afablecon paroli iom pli malrapide kaj pli klare mi nepre ĉion komprenus.

Fast alles. Aber wenn Sie so liebenswürdig sein wollten, etwas langsamer und deutlicher zu sprechen, würde ich durchaus alles verstehen.

Tre volonte. Mi estas Berlinano kaj, kiel vi eble scias, la Berlinanoj ofte kutimas paroli sufiĉe rapide.

Recht gern. Ich bin Berliner und wie Ihnen vielleicht bekannt ist, pflegen oft die Berliner ziemlich schnell zu sprechen.

[6]

Ĉu mia elparolado estas ĝusta?

Ist meine Aussprache richtig?

Vi elparolas tre bone. (Via elparolado estas tre bona.)

Sie sprechen sehr gut aus. (Sie haben eine sehr gute Aussprache.)

Vi ne elparolas malbone.

Sie sprechen nicht schlecht aus.

De longe mi ne parolis Esperanton, al mi mankas ekzercado.

Ich habe lange nicht Esperanto gesprochen; es fehlt mir an der Uebung.

Mi nur tre malofte havas okazon paroli esperante kaj mi forgesis preskaŭ ĉion, kion mi lernis.

Ich habe sehr selten Gelegenheit, Esperanto zu sprechen und fast alles, was ich gelernt habe, vergessen.

Antaŭe mi parolis multe pli flue.

Früher habe ich viel geläufiger gesprochen.

Ĉu vi ankaŭ lernis fremdajn lingvojn?

Haben Sie auch fremde Sprachen gelernt?

Jes, mi lernis francan kaj anglan lingvojn, sed ili estas multe pli malfacilaj ol Esperanto.

Ja, ich habe Französisch und Englisch gelernt; diese Sprachen sind aber viel schwerer als Esperanto.

Kiom da tempo vi bezonis por lerni la francan lingvon?

Wie lange haben Sie gebraucht, um die französische Sprache zu lernen?

Mi studadis ĝin dum pli ol kvar jaroj.

Ich habe mich mit ihrer Erlernung über vier Jahre beschäftigt.

Se oni volas lerni paroli flue fremdan lingvon, oni devas restadi sufiĉe longe en la fremda lando.

Wenn man eine fremde Sprache geläufig sprechen lernen will, muss man sich eine Zeitlang in dem betreffenden Lande aufhalten.

[7]

Ĉu mi ofte faras erarojn?

Mache ich oft Fehler?

Vi kelkafoje forgesas la tonan akcenton.

Sie vergessen manchmal die Betonung.

Mi estus al vi tre danka, se vi bonvolus atentigi min pri miaj eraroj.

Ich wär Ihnen sehr dankbar, wenn Sie mich auf meine Fehler aufmerksam machen wollten.

Kiel vi elparolas la vorton ....?

Wie sprechen Sie das Wort .... aus?

Tiu ĉi vorto estas elparolata ....

Dieses Wort wird.... ausgesprochen.

Pardonu, Sinjoro, mi ne komprenis vin bone. Kion vi diras?

Entschuldigen Sie, ich habe Sie nicht recht verstanden. Wie meinen Sie?

Mi neniam aŭdis tiun ĉi esprimon. (Mi ne konas tiun ĉi vorton.)

Ich habe diesen Ausdruck noch nie gehört. (Dieses Wort ist mir unbekannt.)

Kiel oni nomas (diras).... en Esperanto?

Was heisst.... auf Esperanto?

Kiel oni nomas tion-ĉi? (Kio estas tio-ĉi?)

Wie heisst dies? (Was ist das?)

Kiel oni skribas tiun ĉi vorton?

Wie wird dieses Wort geschrieben?

Silabu ĝin, mi petas.

Bitte, buchstabieren Sie es.

Kun n ĉe la fino?

Mit einem n am Ende?

Tiu ĉi vorto estas malfacile elparolebla.

Dieses Wort ist schwer auszusprechen.

[8]

Estas vorto, kiun oni ne devas uzi.

Das ist ein Wort, das man nicht anwenden darf.

Tiu ĉi vorto estas malofte uzata.

Dieses Wort ist wenig gebräuchlich.

Mi ne povos rememori tiun ĉi esprimon.

Ich werde diesen Ausdruck nicht merken können.

Ĉu oni povas diri tiel, ĉu tio estas bona Esperanto?

Kann man so sagen, ist das richtiges Esperanto?

Tio estas tute korekta.

Das ist ganz richtig.

Mi tion tradukis laŭvorte, kaj kredis, ke tiu esprimo estas germanismo.

Ich hatte das wörtlich übersetzt und glaubte, dass diese Redensart ein Germanismus sei.

II.
Salutoj kaj komplimentoj.

II.
Begrüssungs- und Höflichkeitsredensarten.

Bonan tagon, (bonan vesperon), Sinjoro N. Kiel vi fartas?

Guten Tag, (guten Abend), Herr N. Wie geht es Ihnen?

Dankon, bone, (bonege), kaj vi? (Kaj kiel vi fartas mem?)

Danke, gut, (vorzüglich), und Ihnen? (Und wie geht es Ihnen selbst?)

Mi fartas bone, mi dankas.

Mir geht's gut, danke.

Kiel fartas Sinjoro via frato? Bone, mi esperas.

Wie geht's Ihrem Herrn Bruder? Hoffentlich gut.

Ĉu hejme ĉiuj bone fartas?

Geht's zu Hause allen gut?

Salutu Sinjoron R. de mi!

Grüssen Sie Herrn R. von mir!

[9]

Memorigu min al Sinjorino via edzino!

Empfehlen Sie mich Ihrer Frau Gemahlin!

Dankon, mi ne forgesos.

Danke, ich werde es ausrichten.

Adiaŭ! Bonan nokton!

Adieu! Gute Nacht!

Ĝis la revido! Ĝis baldaŭa revido!

Auf Wiedersehn! Auf baldiges Wiedersehn!

Ĝis ĵaŭdo!

Auf Wiedersehn am Donnerstag!

Ĝis morgaŭ!

Auf Wiedersehn morgen!

Ĝis hodiaŭ vespere!

Auf Wiedersehn heute abend!

Fartu bone, kara amiko! Bonan vojaĝon!

Leb’ wohl, lieber Freund! Glückliche Reise!

Revenu baldaŭ!

Kommen Sie bald wieder!

Vi ĉiam estos bonvenanta.

Sie werden immer willkommen sein.

Vizitu min iam, mi petas! Sed ne forgesu!

Besuchen Sie mich, bitte, einmal! Aber kommen Sie auch!

Koran (sinceran) dankon!

Herzlichen Dank!

Mi tre dankas vin.

Ich danke Ihnen sehr.

Plej bonan dankon.

Besten Dank.

Vi estas vere tre afabla.

Sie sind wirklich zu liebenswürdig.

Estas tre afable de vi.

Sehr liebenswürdig von Ihnen.

Mi estas tre danka.

Sehr verbunden.

[10]

Ĉu mi povus peti vin....?

Dürfte ich Sie bitten, zu....?

Ĉu vi havus la afablecon diri al mi....

Würden Sie so liebenswürdig sein, mir zu sagen....

Faru al mi la favoron....

Tun Sie mir den Gefallen, zu....

Mi estus al vi tre danka, se vi bonvolus pasigi al mi mian ĉapelon.

Ich würde Ihnen sehr dankbar sein, wenn Sie mir mal meinen Hut herüberreichen wollten.

Volonte.

Gern.

Certe, tre volonte. Kun plezuro.

Gewiss, recht gern. Mit Vergnügen.

Mi treege bedaŭras, mi ne povas tion diri al vi. Mi tre bedaŭras, ke....

Ich bedauere unendlich, ich kann es Ihnen nicht sagen. Es tut mir sehr leid, dass....

Mi petas pardonon.

Ich bitte um Entschuldigung.

Pardonu Sinjoro!

Entschuldigen Sie!

Mi petas! (Tio estas nenio.)

Bitte sehr! (Das macht nichts.)

Ĉu vi permesas, ke mi iom malfermu la fenestron?—Certe, Sinjoro!

Gestatten Sie, dass ich das Fenster ein wenig aufmache?—Bitte!

Pardonu se mi vin ĝenas.

Entschuldigen Sie, dass ich störe.

Bonvolu sidiĝi.

Bitte, nehmen Sie Platz!

Kion vi diris? (Vi diris? Sinjoro?)

Wie beliebt? (Wie meinen Sie?)

Permesu, ke mi prezentu al vi Sinjoron X.

Gestatten Sie, dass ich Ihnen Herrn X. vorstelle.

[11]

Mi tre ĝojas konatiĝi kun vi. (Ke mi konatiĝis kun vi.)

Es freut mich sehr, Ihre Bekanntschaft zu machen. (Sie kennen gelernt zu haben.)

Mi deziras al vi multan plezuron.

Ich wünsche Ihnen viel Vergnügen.

Dankon, same al vi!

Danke, gleichfalls!

Mi deziras al vi la samon!

Das wünsche ich Ihnen gleichfalls!

Miajn korajn bondezirojn por via naskiĝa tago!

Meinen herzlichen Glückwunsch zum Geburtstag!

Mi gratulas vin!

Ich gratuliere Ihnen!

Mi deziras al vi feliĉan novan jaron!

Ich wünsche Ihnen ein glückliches neues Jahr!

Multan feliĉon! (Bonan sukceson!)

Viel Glück! (Guten Erfolg!)

Sanon al vi!

Auf Ihr Wohl! (Prosit!)

III.
Leviĝo.

III.
Aufstehen.

Je kioma horo vi kutime leviĝas?

Wann stehen Sie gewöhnlich auf?

Mi kutime leviĝas somere je la 6a kaj vintre je la 7a.

Ich stehe in der Regel im Sommer um sechs und im Winter um sieben auf.

Kaj kiam vi kuŝiĝas?

Und wann gehen Sie zu Bett?

Mi kuŝiĝas frue.

Ich gehe frühzeitig zu Bett.

[12]

Kio estas »frue«? Ĉu meznokto?

Was nennen Sie »frühzeitig«? Zwölf Uhr nachts?

Meznokto? Tion mi nomas malfrue. Mi ordinare iras en liton ĉirkaŭ la deka vespere.

Mitternacht? Das nenne ich spät. Ich gehe gewöhnlich gegen zehn Uhr abends schlafen.

Ĉu vi jam estas laca je tiu horo?

Sind Sie um diese Zeit schon müde?

Ne okazas malofte, ke mi eĉ pli frue kuŝiĝas.

Es kommt nicht selten vor, dass ich schon früher zu Bett gehe.

Ĉu vi ekdormas tuj?

Schlafen Sie sofort ein?

Ne ĉiam. Iafoje mi ekdormas nur tre malfrue.

Nicht immer. Mitunter schlafe ich erst sehr spät ein.

Ĉu vi tuj reekdormas, kiam vi vekiĝis dum la nokto?

Schlafen Sie gleich wieder ein, wenn Sie in der Nacht aufwachen?

Ĉu oni vekas vin matene, aŭ ĉu vi mem vekiĝas?

Werden Sie des Morgens geweckt, oder wachen Sie von selbst auf?

Ĉu vi bezonas multe da tempo por vin vesti?

Brauchen Sie lange zum Anziehen?

Ne; se estas necese, mi povas vesti min en kvin minutoj.

Nein; wenn es nötig ist, kann ich mich in fünf Minuten ankleiden.

Leviĝu, Sinjoro X.! Jam estas duono de la oka.

Stehen Sie auf, Herr X.! Es ist schon halb acht.

Jam tiel malfrue? Mi ja diris al vi hieraŭ vespere, ke vi veku min je la sepa precize!

Schon so spät? Ich hatte Ihnen doch gestern abend gesagt, Sie möchten mich pünktlich um sieben Uhr wecken!

[13]

Jam la kvinan fojon mi frapas la pordon! Ne estas mia kulpo, se vi ankoraŭ kuŝas en lito.

Jetzt klopfe ich schon zum fünften Mal! Es ist nicht meine Schuld, wenn Sie noch im Bett liegen.

Vere strange! Mi tamen ĝenerale vekiĝas ĉe la plej malgranda bruo.

Wirklich sonderbar! Ich wache doch sonst beim geringsten Geräusch auf.

Sed mi certigas vin, sinjoro ...

Aber ich versichere Ihnen ...

Bone, bone! Mi ne dubas, sed estas tamen strange.

Schon gut, ich zweifle nicht daran, aber es ist trotzdem merkwürdig.

Vi eble kuŝiĝis iom malfrue? Tiam ja povas okazi, ke oni matene ne tuj vekiĝas.

Sie sind vielleicht etwas spät zu Bett gegangen? Da kann es schon vorkommen, dass man des Morgens nicht gleich aufwacht.

Male, mi tre frue iris en liton. Vere estas, ke mi ne povis tuj ekdormi. Sed nun tuj alportu puran akvon, por ke mi povu lavi min.

Im Gegenteil, ich bin sehr früh zu Bett gegangen. Allerdings konnte ich nicht so bald einschlafen. Aber nun bringen Sie mir schnell reines Wasser, damit ich mich waschen kann.

Ĉu vi deziras varman aŭ malvarman akvon?

Wünschen Sie warmes oder kaltes Wasser?

Mi preferas malvarman; ĝi estas pli saniga.

Ich ziehe kaltes vor; das ist gesünder.

[14]

Kie estas la sapo?

Wo ist die Seife?

Jen sapo, mantuko, kombilo kaj harbroso.

Hier ist Seife, Handtuch, Kamm und Haarbürste.

Kien mi do metis mian dentbroson? Ha, jen ĝi estas.

Wo habe ich denn meine Zahnbürste hingelegt? Ach, da ist sie ja.

Mi devas rapidi min vesti, alie mi alvenos tro malfrue en la oficejo.

Ich muss mich mit dem Anziehen beeilen, sonst komme ich zu spät ins Geschäft.

Diru do, ĉu la lavistino alportis mian tolaĵon?

Sagen Sie mal, hat die Wäscherin meine Wäsche gebracht?

Jes, sinjoro. Jen la kalkulo: kvar tagĉemizoj, kvar nokt-ĉemizoj, dek kolumoj, ok paroj da manumoj, dek paroj da ŝtrumpoj, kvin kalsonoj kaj dekkvar poŝtukoj.

Ja. Hier ist die Rechnung: 4 Oberhemden (Taghemden), 4 Nachthemden, 10 Kragen, 8 Paar Manschetten, 10 Paar Strümpfe, 5 Unterhosen und 14 Taschentücher.

Ĉu vi purigis miajn vestojn?

Haben Sie meine Kleider gereinigt?

Jes, mi ilin bone brosis; ili estis tre malpuraj (kovritaj de polvo). Jen ili estas.

Ja, ich habe sie tüchtig ausgebürstet; sie waren gehörig schmutzig (staubig). Hier sind sie.

Estas al mi neeble surmeti tiun ĉi vestaĵon; sur la pantalono estas granda makulo.

Ich kann diesen Anzug unmöglich anziehen; am Beinkleid ist ein grosser Fleck.

Mi faris mian eblon, mi surŝprucis la pantalonon per benzino kaj forte frotis, sed mi ne sukcesis forigi la makulon.

Ich habe mein Möglichstes getan, ich habe das Beinkleid mit Benzin angefeuchtet und es kräftig gerieben, aber es ist mir nicht gelungen, den Fleck herauszubringen.

Tiam mi surmetos mian grizan pantalonon kaj mian bluan ĵaketon (mian nigran redingoton).

Dann werde ich meine graue Hose und mein blaues Jackett (meinen schwarzen Gehrock) anziehen.

Kaj kian veŝton?

Und was für eine Weste?

Tiun ĉi. Ne, ĝi estas tro malfermita, ni prenu tiun, ĝi estas fermita.

Diese hier. Ach nein, die ist zu weit ausgeschnitten, nehmen wir die dort, die ist geschlossen.

Kiel vi trovas tiun ĉi kravaton?

Wie finden Sie diese Krawatte?

Ĝi tre plaĉas al mi.

Sie gefällt mir sehr.

Kien vi metis miajn ŝuojn?

Wo haben Sie meine Stiefel hingestellt?

Ne forgesu surmeti viajn gumŝuojn; estas tre malpure sur la strato.

Vergessen Sie nicht, Ihre Gummischuhe anzuziehen; es ist sehr schmutzig auf der Strasse.

Ĉu mi devas surmeti mian surtuton?

Muss ich den Ueberzieher anziehen?

Ĉu vi volas rekudri por mi tiun ĉi butonon? Espereble tio ne daŭros longe.

Wollen Sie mir diesen Knopf annähen? Hoffentlich dauerts nicht lange.

[16]

Vi volas surmeti vian cilindran ĉapelon? Prenu prefere tiun ĉi molan ĉapelon, ĝi estas al vi pli konvena, kaj cetere ankaŭ pluvas sufiĉe forte.

Sie wollen Ihren Zylinder aufsetzen? Setzen Sie doch diesen weichen Hut auf, er steht Ihnen viel besser, und dann regnet es auch gehörig.

Jen via pluvombrelo (via bastono) kaj jen viaj gantoj.

Hier ist Ihr Regenschirm (Ihr Stock) und da sind Ihre Handschuhe.

Bone, mi nun estas preta.

So, nun bin ich fertig.

Igu ripari tiujn ĉi vestojn kaj tiujn piedvestojn.

Lassen Sie diese Kleider und dieses Schuhzeug ausbessern.

IV.
Kuŝiĝo.

IV.
Zu Bett gehen.

Mi estas laca. Mi hodiaŭ kuŝiĝos baldaŭ.

Ich bin müde. Ich werde heute bald zu Bett gehen.

Ĉu la dormoĉambro estas preta?

Ist im Schlafzimmer alles fertig?

Jes. Ĉu mi devas lasi malfermita la fenestron?

Ja. Soll ich das Fenster offen lassen?

Ne tute malfermita, nur duone, sed fermu la fenestrajn kovrilojn.

Nicht ganz offen, nur halb offen, aber schliessen Sie die Fensterläden.

Mi ne sukcesas tiri miajn botojn. Kie estas la bottirilo?

Ich bekomme meine Stiefel nicht aus. Wo ist der Stiefelknecht?

[17]

Jen viaj pantofloj kaj via ĉambrorobo.

Hier sind Ihre Pantoffel und Ihr Schlafrock.

Ĉu vi jam estas en lito?

Sind Sie schon im Bett?

Ankoraŭ ne, sed mi jam senvestiĝis kaj mi tuj iros en la liton.

Noch nicht, aber ich habe mich schon ausgezogen und will eben zu Bett gehen.

Je kioma horo mi devos veki vin morgaŭ matene?

Wann soll ich Sie morgen früh wecken?

Veku min je la sesa! Sed certe!

Wecken Sie mich um sechs! Aber bestimmt!

Ne forgesu ŝlosi vian pordon.

Vergessen Sie nicht, Ihre Tür abzuschliessen.

Ne! Bonan nokton!

Nein! Gute Nacht!

V.
Vetero.

V.
Wetter.

Kia vetero estas hodiaŭ?

Was ist heute für Wetter?

Kian veteron ni havas hodiaŭ?

Was für Wetter haben wir heute?

Kian veteron ni kredeble havos hodiaŭ posttagmeze?

Was für Wetter werden wir wohl heute nachmittag haben?

Estas hodiaŭ bela (malbela) vetero.

Es ist heute schönes (schlechtes) Wetter.

Estas malhele.

Es ist trüb.

Estas malseke.

Es ist feucht (nass).

[18]

Ĉu estas malpure sur la strato?

Ist es schmutzig auf der Strasse?

Tre malpure; hieraŭ pluvis la tutan tagon.

Sehr schmutzig; gestern hat es den ganzen Tag geregnet.

Tuj rekomencos pluvi.

Es wird gleich wieder anfangen zu regnen.

La ĉielo estas kovrita (de nuboj).

Der Himmel ist (mit Wolken) bedeckt.

La vetero estas ŝanĝema.

Das Wetter ist veränderlich.

La barometro montras konstantan veteron.

Das Barometer zeigt beständiges Wetter an.

Ĝi montras pluvon (venton).

Es zeigt Regen (Wind) an.

Ĝi supreniris, (malsupreniris, falis).

Es ist gestiegen (gefallen).

Estas belega vetero.

Es ist prachtvolles Wetter.

La ĉielo estas sennuba.

Der Himmel ist unbewölkt.

La suno brilas.

Die Sonne scheint.

Estas tre varme.

Es ist sehr warm.

Estas terura (sufoka) varmo.

Es ist eine furchtbare (drückende) Hitze.

Kiom da gradoj ni havas?

Wieviel Grad haben wir?

Mi volas vidi. Estas nekredeble. Ni havas dudek-ok gradojn en ombro!

Ich will mal nachsehen. Das ist ja unglaublich! Es sind 28 Grad im Schatten!

Mi ŝvitas terure.

Ich schwitze fürchterlich.

Kia sufoka varmeco! Mi kredas, ke ni havos fulmotondron.

Wie schwül es ist! Ich glaube, es wird ein Gewitter geben.

[19]

Jam komencas tondri.

Da fängt es schon an zu donnern.

Ĉu vi aŭdas la tondradon?

Hören Sie das Donnern?

Fulmas.

Es blitzt.

La fulmofajro frapis.

Es hat eingeschlagen.

Kia fortega bato!

War das ein heftiger Schlag!

Pluvas torente. Mi estas tute malseka. Ni serĉu ŝirmaĵon.

Es regnet in Strömen. Ich bin völlig durchnässt. Treten wir irgendwo unter!

Dank’ al Dio! Ĉesas pluvi.

Gott sei Dank! Es hört auf zu regnen.

Pasis la fulmotondro. Jen la suno reekbrilas.

Das Gewitter ist vorüber. Da scheint die Sonne wieder.

Rigardu! Kia bela ĉielarko!

Sehen Sie da! Welch schöner Regenbogen!

Estas diable malvarme hodiaŭ!

Es ist verteufelt kalt heute!

Ĉu ne estas al vi malvarme?

Frieren Sie nicht?

Tute ne, mi estas varme vestita.

Durchaus nicht, ich bin warm angezogen.

Ni havas dek gradojn sub nulo (10° da malvarmo).

Wir haben zehn Grad unter Null (10° Kälte).

Frostis; ni havas belan glacion.

Es hat gefroren; wir haben schönes Eis.

Neĝas.

Es schneit.

Degelas; la neĝo fluidiĝas.

Es taut; der Schnee schmilzt.

Ventas, (vento blovas).

Es ist windig.

[20]

La vento venas el nordo; ĝi turnis orienten, ĝi ĉesas.

Der Wind kommt aus Norden; er hat sich nach Osten gedreht, er legt sich.

Estas nebule.

Es ist neblig.

Densa nebulo falis.

Es ist ein dichter Nebel gefallen.

La nebulo baldaŭ disiĝos.

Der Nebel wird sich bald erheben (zerstreuen).

Hajlas.

Es hagelt.

Estas neeble eliri ĉe tia vetero; la stratoj estas tre malpuraj.

Bei solchem Wetter kann man unmöglich ausgehen; die Strassen sind sehr schmutzig.

Efektive, estas pli bone resti hejme, ĝis la vetero rebeliĝos.

Wirklich, es ist besser, man bleibt zu Hause, bis das Wetter wieder schön wird.

Ĝi komencas pliheliĝi, la nuboj foriĝas.

Es fängt an, sich aufzuheitern; die Wolken zerteilen sich.

La luno brilas.

Der Mond scheint.

Ni iom iru en la freŝan aeron.

Gehen wir etwas an die frische Luft.

La vesperruĝo promesas belan veteron.

Die Abendröte verspricht schönes Wetter.

---

[21]

VI.
Horo. Dato.

VI.
Uhr. Datum.

Kioma horo estas?

Wieviel Uhr ist es?

Kioman horon montras via poŝhorloĝo?

Wieviel Uhr ist es bei Ihnen (an Ihrer Taschenuhr)?

Pardonu Sinjoro, ĉu vi povus diri al mi la horon?

Entschuldigen Sie, könnten Sie mir wohl sagen, wieviel Uhr es ist?

Mi tre bedaŭras, mi ne havas poŝhorloĝon kun mi.

Ich bedaure sehr, ich habe keine Uhr bei mir.

Mia poŝhorloĝo ne iras plu, (ĝi haltis); mi forgesis ĝin streĉi.

Meine Uhr geht nicht mehr (sie steht); ich habe vergessen, sie aufzuziehen.

Mia horloĝo trofruas je kvin minutoj (malfruas je kvin minutoj).

Meine Uhr geht 5 Minuten vor (geht 5 Minuten nach).

Permesu, ke mi reguligu mian horloĝon laŭ la via.

Gestatten Sie, dass ich meine Uhr nach der Ihrigen stelle.

Estas la kvina (horo).

Es ist um 5.

Estas la tria precize.

Es ist genau 3 Uhr.

Estas ĝuste duono de la sepa (la sesa kaj duono).

Es ist gerade (genau) ½ 7.

Estas kvarono de la tria (kvarono post la dua).

Es ist ¼ 3.

Estas tri kvaronoj de la sepa (tri kvaronoj post la sesa).

Es ist ¾ 7 (¼ vor 7).

Estas ok minutoj post la naŭa.

Es ist 8 Minuten nach 9.

[22]

Ĉu vi scias, ĉu jam eksonoris la deka horo?

Wissen Sie, ob es schon 10 Uhr geschlagen hat?

Ĵus eksonoris la deka.

Es hat soeben 10 Uhr geschlagen.

Tuj eksonoros la deka.

Es wird gleich 10 schlagen.

Jam estas post la deka.

Es ist nach 10 (10 vorbei).

Estas tagmezo (noktomezo).

Es ist 12 Uhr mittags (12 Uhr nachts).

Mi kredis, ke estas pli malfrue.

Ich glaubte, es sei später.

Ĉu jam estas tiel malfrue?

Es ist schon so spät?

Je kioma horo li alvenis?

Um wieviel Uhr ist er angekommen?

Je tri kvaronoj de la sesa (je la kvina, 45 minutoj).

Um ¾ 6. (¼ vor 6.)

Kiu dato estas hodiaŭ?

Der wievielte ist heute?

Kiun daton ni havas?

Den wievielten haben wir?

Hodiaŭ estas la sepa (ni havas la sepan).

Heute ist der siebente (wir haben den siebenten).

Kiu tago estas hodiaŭ?

Was für ein Tag ist heute?

Hodiaŭ estas lundo, ne, mardo.

Heute ist Montag, nein, Dienstag.

VII.
Malsaneco.

VII.
Krankheit.

Vi ne havas bonan mienon; (vi havas vere malbonan mienon), kara amiko.

Sie sehen nicht gut aus (Sie sehen wirklich schlecht aus), lieber Freund.

[23]

Mi estas iom pala, ĉu ne?

Ich sehe etwas blass aus, nicht?

Tre pala! Ŝajnas, ke vi ne fartas tre bone.

Sehr blass! Sie scheinen sich nicht ganz wohl zu fühlen.

Via lango estas iom kovrita.

Ihre Zunge ist etwas belegt.

Mi sentas min tute nebone. (Mi estas malsana, malsaneta).

Ich befinde mich gar nicht wohl. (Ich bin krank, etwas unwohl.)

Ho, mi bedaŭras! Mi jam tion pensis. Kio estas al vi?

Oh! das tut mir leid. Ich dachte es mir. Was fehlt Ihnen?

Mi malvarmumis.

Ich bin erkältet.

Nenia miro, ĉe tia vetero!

Kein Wunder bei solchem Wetter!

Min kaptis forta nazkataro.

Ich habe mir einen starken Katarrh (Schnupfen) geholt.

Vi estas tre raŭka.

Sie sind sehr heiser.

Mi havas kapdoloron (mia kapo terure doloras).

Ich habe Kopfschmerz (ich habe fürchterliche Kopfschmerzen).

Espereble vi ne serioze malsaniĝis.

Hoffentlich haben Sie sich nicht eine ernstliche Krankheit zugezogen.

Ĉu vi havas febron?

Haben Sie Fieber?

Vi estos prava alvoki la kuraciston.

Sie werden gut tun, den Arzt holen zu lassen.

Mi jam konsultis la kuraciston.

Ich habe schon den Arzt zu Rate gezogen.

[24]

Li kredeble diris al vi, ke vi restu en ĉambro (en lito)?

Er hat Ihnen wohl gesagt, Sie möchten das Zimmer (Bett) hüten?

Ĝuste. Li ankaŭ malpermesis al mi fumi.

Ganz recht. Auch hat er mir das Rauchen verboten.

Vi devas akurate sekvi liajn ordonojn, por ke vi baldaŭ resaniĝu.

Sie müssen seine Vorschriften genau befolgen, damit Sie bald wieder gesund werden.

Mi deziras al vi baldaŭan kaj plenan resaniĝon.

Ich wünsche Ihnen baldige und völlige Genesung.

Estas al mi malbone (mi estas vomema).

Es ist mir übel.

Donu al mi, mi petas, glason da akvo; tio faros al mi bonon.

Geben Sie mir, bitte, ein Glas Wasser, das wird mir gut tun.

Tio ne estas danĝera, ĝi baldaŭ pasos.

Das ist nicht schlimm, das wird bald vorübergehen.

Ĉu estas al vi pli bone nun?

Ist es Ihnen jetzt besser?

Jes, iom, dankon.

Ja, ein wenig, danke.

Ni iru en la freŝan aeron, tio tute resanigos vin. Oni sufokas tie ĉi.

Gehen wir an die frische Luft, das wird Sie vollständig wiederherstellen. Hier erstickt man.

Mi havas dentdolorojn.

Ich habe Zahnschmerzen.

Haben Sie oft Zahnschmerzen?

Ĉu vi ofte havas dentdolorojn?

Feliĉe ne.

Glücklicherweise nicht.

Ĉu vi multe suferas?

Haben Sie grosse Schmerzen?

[25]

Se mi estus vi, mi igus eltiri la malbonan denton.

An Ihrer Stelle würde ich mir den schlechten Zahn ausziehen lassen.

Mia piedo (mano) doloras, mi ne povas marŝi (skribi).

Ich habe Schmerzen am Fuss (an der Hand), ich kann nicht laufen (schreiben).

Ĉu vi distordis vian piedon?

Haben Sie sich den Fuss verstaucht?

Ne, estas rompo.

Nein, es ist ein Bruch.

VIII.
Aĝo. Korpaj ecoj.

VIII.
Alter. Körperliche Eigenschaften.

Kian aĝon vi havas?

Wie alt sind Sie?

Laŭ via opinio, kian aĝon mi havas?

Für wie alt halten Sie mich?

Vi kredeble havas dudek ok ĝis tridek jarojn.

Sie werden vielleicht 28 bis 30 Jahre alt sein.

Vi bone divenis. Mi havas dudek naŭ jarojn.

Sie haben gut geraten. Ich bin 29 Jahre alt.

Mi baldaŭ estos tridekjara.

Ich werde bald 30 Jahre alt sein.

Mia frato komencas sian deksesan jaron.

Mein Bruder geht ins sechzehnte Jahr.

Via frato estas do multe pli juna ol vi.

Ihr Bruder ist also viel jünger als Sie.

Li estas dektri jarojn pli juna ol mi.

Er ist 13 Jahre jünger als ich.

[26]

Mia patrino estas pli maljuna ol mia patro; ŝi estas sesdekjara, mia patro estas nur kvindek ok-jara.

Meine Mutter ist älter als mein Vater; sie ist 60 Jahre alt, mein Vater ist erst 58.

Sinjorino via patrino ŝajnas pli juna ol ŝi estas, dum sinjoro via patro ŝajnas pli maljuna.

Ihrer Frau Mutter sieht man ihr Alter nicht an, während Ihr Herr Vater älter aussieht, als er ist.

Kiam vi naskiĝis?

Wann sind Sie geboren?

La dudek trian de Aŭgusto mil okcent sesdek ok.

Am 23. August 1868.

Ĉu vi konas Sinjoron S.?

Kennen Sie Herrn S.?

Mi konas lin nur per la vido.

Ich kenne ihn nur vom Sehen.

Kiel li estas (aspektas)?

Wie sieht er aus?

Ĉu li estas alt- aŭ malaltkreska?

Ist er von hoher oder kleiner Gestalt?

Ĉu li havas blondajn aŭ nigrajn harojn?

Hat er blondes oder schwarzes Haar?

Kia estas la koloro de liaj okuloj?

Was für eine Farbe haben seine Augen?

Li havas mezan staturon, estas larĝaŝultra kaj iom dika, havas brunajn harojn kaj bluajn okulojn.

Er ist von mittlerer Gestalt, breitschultrig und etwas stark (dick), hat braunes Haar und blaue Augen.

Ĉu li portas barbon?

Trägt er einen Bart?

Jes, li portas plenbarbon.

Ja, er trägt einen Vollbart.

[27]

Mia frato havas malgrandan liphararon kaj mia patro portas vangharojn.

Mein Bruder hat einen kleinen Schnurrbart, und mein Vater trägt einen Backenbart.

Ĉu via frato similas vin?

Ist Ihnen Ihr Bruder ähnlich?

Li tre similas min, sed ankoraŭ pli mian pli junan fraton.

Er ist mir sehr ähnlich, aber noch mehr meinem jüngeren Bruder.

Li ne estas tiel granda kiel mi, sed li estas pli dika.

Er ist nicht so gross wie ich, aber er ist dicker.

Mi estas iom miopa.

Ich bin ein wenig kurzsichtig.

Kiam oni estas miopa oni devas porti okulvitrojn aŭ nazumon.

Wenn man kurzsichtig ist, muss man eine Brille oder einen Kneifer tragen.

Estas bela viro. Kia domaĝo ke li iom lamas!

Das ist ein schöner Mann. Wie schade, dass er etwas hinkt!

Kompatindulo! Li estas surdmuta (blinda).

Der arme Mann! Er ist taubstumm (blind).

IX.
Sur la strato.

IX.
Auf der Strasse.

A. Demandado pri la vojo.

A. Nach dem Wege fragen.

Pardonu sinjoro, kie estas la ... strato?

Entschuldigen Sie, wo ist die ... Strasse?

Iru trans tiun ĉi placon, marŝu maldekstren kaj iru laŭlonge la ... straton ĝis la tria dekstre.

Gehen Sie über diesen Platz, halten Sie sich links und gehen Sie dann die.... strasse hinunter bis zur dritten Querstrasse rechts.

[28]

Iru ĝis la fino de tiu ĉi strato kaj poste direktu vin dekstren.

Gehen Sie bis zum Ende dieser Strasse und wenden Sie sich dann nach rechts.

Iru ĉiam rekte antaŭen.

Gehen Sie immer geradeaus.

Mi tre dankas.

Danke sehr!

Pardonu, ĉu vi povas diri kiu estas la plej mallonga vojo al la norda stacidomo?

Entschuldigen Sie, können Sie mir sagen, welches der kürzeste Weg nach dem Nordbahnhof ist?

Mi tre bedaŭras, mi mem estas fremda.

Ich bedauere sehr, ich bin hier selbst fremd.

Jen estas policano; li tion povos diri al vi.

Da ist ein Schutzmann, er wird es Ihnen sagen können.

Kiom da tempo estas necesa por iri ĝis tie?

Wie lange braucht man bis dahin?

Nur kelkaj minutoj. Ne estas malproksime.

Ein paar Minuten nur. Das ist nicht weit.

Vi eraris, sinjoro! Reiru malantaŭen laŭlonge la straton.

Sie haben sich verlaufen! Kehren Sie um, und gehen Sie die Strasse wieder hinunter.

Diru do, knabo, ĉu vi scias kia konstruaĵo estas tiu ĉi?

Sag' mal, mein Junge, weisst du, was für ein Gebäude das ist?

Certe sinjoro, ĝi estas la reĝa palaco.

Jawohl, mein Herr, das ist das königliche Schloss.

B. Renkonto.

B. Begegnung.

Ha! kia ŝanco! Bonan tagon sinjoro M. Ĉu vi bone fartas?

Ah! welch glücklicher Zufall! Guten Tag, Herr M. Geht's gut?

Jes, dankon, kaj vi?

Danke, ja, und Ihnen?

Kien vi iras?

Wohin gehen Sie?

Mi volas iri al mia frato. Ĉu vi volas min akompani?

Ich will zu meinem Bruder gehen. Wollen Sie mich begleiten?

Volonte, kondiĉe ke mia societo ne estas al vi maloportuna.

Gern, vorausgesetzt, dass Ihnen meine Gesellschaft nicht allzu lästig ist.

Sed, kontraŭe, mi tre ĝojas ke mi vin renkontis.

Aber, im Gegenteil, es freut mich sehr, dass ich Sie getroffen habe.

Ni iru sur la alian flankon; estas tro multe da homoj tie ĉi.

Gehen wir auf die andere Seite; hier sind zuviel Menschen.

Atentu ke vi ne falu, la pavimo estas tre glitiga.

Geben Sie acht, dass Sie nicht fallen, das Pflaster ist sehr glatt.

Atentu! Jen venas veturilo.

Vorsicht! Da kommt ein Wagen!

Kiom da veturiloj! Estas vere tre danĝere transiri la straton.

Was für eine Menge Wagen! Es ist wirklich lebensgefährlich, über die Strasse zu gehen.

C. Tramvojo.

C. Strassenbahn.

Ni veturu per la tramvojo. Ĝuste venas veturilo kiu iras al la.... strato.

Lassen Sie uns mit der Strassenbahn fahren. Da kommt gerade ein Wagen, der nach der ...strasse geht.

[30]

Jam ne estas loko, ni iom atendu, baldaŭ venos alia veturilo.

Es ist kein Platz mehr, warten wir etwas, es wird gleich ein anderer Wagen kommen.

Ni eniru rapide! La veturilo ne haltos longe.

Steigen wir schnell ein! Der Wagen wird nicht lange halten.

Konduktoro, ĉu vi veturas tra la ... strato?

Schaffner, kommen Sie durch die ...Strasse?

Kiom kostas la veturado?

Wieviel kostet die Fahrt?

Ni eliros ĉe la proksima haltejo.

Wir wollen an der nächsten Haltestelle aussteigen.

D. Fiakro.

D. Droschke.

Kie estas la plej proksima haltejo de fiakroj!

Wo ist der nächste Droschkenhalteplatz?

Jen venas fiakro kiu ŝajnas libera.

Da kommt eine Droschke, die unbesetzt zu sein scheint.

Veturigisto (fiakristo)! Ĉu vi estas libera?

Kutscher! Sind Sie frei?

Jes, Sinjoroj, kien vi volas iri?

Ja, meine Herren, wohin wollen Sie fahren?

Ni dungas vin laŭ tempo. Veturu unue al la ... placo!

Wir nehmen Sie auf Zeit. Fahren Sie zunächst nach dem ...Platz!

Bone, volu eniri.

Schön, steigen Sie, bitte, ein!

[31]

Veturigisto, haltu! Ni volas halti tie ĉi.

Kutscher, halten Sie an! Wir wollen hier aussteigen.

Kiom ni ŝuldas?

Wieviel bekommen Sie?

Jen por vi.

Das ist für Sie.

X.
En magazeno.

X.
Im Laden.

A. Cigarvendejo.

A. Zigarrengeschäft.

Vi deziras, Sinjoro?

Sie wünschen, mein Herr?

Bonan tagon! Per kio mi povas servi?

Guten Tag! Womit kann ich Ihnen dienen?

Mi deziras rusajn cigaredojn.

Ich möchte russische Zigaretten haben.

Mi tre bedaŭras, ni ne havas ilin.

Bedauere sehr, die haben wir nicht.

Tiam, donu egiptajn cigaredojn.

Dann geben Sie mir egyptische.

Mi povas rekomendi al vi tiun ĉi specon por kvar pfenigoj.

Ich kann Ihnen diese Sorte zu vier Pfennig empfehlen.

Bone, mi prenos paketon, kondiĉe, ke tiuj ĉi cigaredoj ne estas tro fortaj.

Schön; ich werde ein Paket davon nehmen, vorausgesetzt, dass diese Zigaretten nicht zu schwer sind.

Ili estas tre malfortaj; mi vendas multe da ili.

Sie sind sehr leicht; ich verkaufe viel davon.

Kiom ĝi kostas?

Wieviel macht das?

[32]

Okdek pfenigojn.

80 Pfennige.

Dankon! Ĝis revido.

Danke! Auf Wiedersehen!

B. Ĉapelvendejo.

B. Hutgeschäft.

Mi deziras havi malpezan ĉapelon.

Ich möchte einen leichten Hut haben.

Ĉu vi deziras feltan aŭ pajlan ĉapelon?

Wünschen Sie einen Filzhut oder einen Strohhut?

Volu montri al mi feltajn ĉapelojn.

Zeigen Sie mir, bitte, etwas in Filzhüten.

En kiaj prezoj?

In welcher Preislage?

De kia koloro? Hela aŭ malhela?

Von welcher Farbe? Hell oder dunkel?

Mi preferas malhelan koloron, ĝi estas pli daŭrema.

Ich ziehe eine dunkle Farbe vor, die trägt sich besser.

Eble io simila? Ĉu vi volas ĝin provi?

Vielleicht so etwas? Wollen Sie ihn einmal probieren?

Ĝi estas tro peza. Ĉu vi ne havas pli malpezan?

Der ist zu schwer. Haben Sie nicht einen leichteren?

Jen unu, kiu estas pli malpeza kaj bone konvenos al vi.

Da ist einer, der leichter ist und der Ihnen gut stehen wird.

Kiom ĝi kostas?

Wieviel kostet der?

Estas multe tro kare.

Das ist viel zu teuer.

Ĉu vi ne havas pli malkarajn?

Haben Sie keine billigeren?

Mi prenos tiun ĉi.

Ich werde diesen da nehmen.

C. Ĉe la ŝuisto.

C. Beim Schuhmacher.

Vi deziras paron da ŝuoj? Ĉu pretajn aŭ laŭ mezuro?

Sie wünschen ein Paar Stiefel? Sollen es fertige sein oder wünschen Sie sie nach Mass?

[33]

Kiom da tempo vi bezonus por fari al mi paron?

Wie lange würden Sie zur Anfertigung eines Paares brauchen?

Ne pli ol tri ĝis kvar tagojn.

Höchstens drei bis vier Tage.

Nu, volu preni mezuron.

Nun, da nehmen Sie mir Mass.

Ĉu mi devas fari ilin por laĉi aŭ por butonumi?

Soll ich sie zum Schnüren oder zum Knöpfen machen?

Mi pli amus havi ilin kun elastaĵoj, estas pli oportune. Sed, mi petas, ne faru ilin tro mallarĝaj.

Ich möchte sie lieber mit Gummizügen haben, das ist bequemer. Aber, bitte, machen Sie sie nicht zu eng.

Vi estos plene kontentigita.

Sie werden vollständig zufrieden sein.

D. En magazeno de gantoj kaj tolaĵoj.

D. Im Handschuh- und Wäschegeschäft.

Donu, mi petas, paron da gantoj.

Geben Sie mir, bitte, ein Paar Handschuhe.

Glaceaj gantoj, ĉu ne?

Glacéhandschuhe, nicht wahr?

Ĉu tiu ĉi koloro plaĉas al vi?

Gefällt Ihnen diese Farbe?

Mi konsilus al vi tiun ĉi nuancon; ĝi estas tre daŭrema.

Ich würde Ihnen zu dieser Farbe raten; die trägt sich sehr gut.

[34]

Ne, mi dezirus ion pli helan.

Nein, ich möchte gern etwas Helleres haben.

Ĉu mi devas ilin iom plilarĝigi?

Soll ich sie etwas aufweiten?

La prezo estas sufiĉe alta.

Der Preis ist ziemlich hoch.

Estas al mi neeble ilin lasi pli malkare; mi tute nenion perlaboras.

Ich kann sie unmöglich billiger lassen; ich verdiene gar nichts daran.

Ĉu vi deziras ankoraŭ ion plu? (Ĉu nenion plu?)

Sonst noch etwas gefällig? (Sonst nichts weiter?)

Mi dezirus ankoraŭ duonan dekduon da ĉemizoj.

Ich möchte noch ein halbes Dutzend Hemden haben.

Tag- aŭ noktĉemizojn?

Tag- oder Nachthemden?

Ĉu vi bezonas antaŭĉemizojn, kolumojn aŭ manumojn?

Brauchen Sie Vorhemdchen, Kragen oder Manschetten?

Dankon, momente mi bezonas nenion da tio.

Danke, augenblicklich brauche ich nichts davon.

Sendu al mi ĉion. Jen mia adreso.

Schicken Sie mir alles zu. Hier ist meine Adresse.

Ĉio estos prizorgita.

Wird bestens besorgt.

E. Ĉe la tajloro.

E. Beim Schneider.

Ĉu vi havas pretajn vestojn?

Haben Sie fertige Anzüge?

Mi tre bedaŭras, Sinjoro. Sed mi povus pretigi al vi unu dum tri tagoj.

Ich bedauere sehr, mein Herr. Aber ich könnte Ihnen einen innerhalb 3 Tagen anfertigen.

Bone, volu preni mezuron, sed antaŭe mi volas elekti la ŝtofon.

Schön! Bitte, nehmen Sie mir Mass, aber erst will ich mir den Stoff aussuchen.

[35]

Jen la nova kolekto de specimenoj da ŝtofo. Vi trovos en ĝi belegajn modelojn.

Hier ist die neue Musterkollektion. Sie werden darin sehr schöne Muster finden.

Ĉu vi havas tiun ĉi ŝtofon en malhela bluo?

Haben Sie den Stoff hier in dunkelblau?

Ne tiun ĉi modelon, sed ion tre similan. Jen, mi petas.

Dieses Muster nicht, aber etwas sehr Aehnliches. Hier, bitte.

Ĉu tio estas pli kara ol la alia?

Ist dies teurer als das andere?

Ne, estas la sama prezo.

Nein, der Preis ist derselbe.

Estas germana fabrikaĵo, ĉu ne?

Das ist deutsches Fabrikat, nicht wahr?

Jes, prave, kaj ĝi estas nun volonte portata.

Ganz recht, und das wird jetzt gern getragen.

Tiam mi prenos tiun ĉi ŝtofon. Kiom kostos vestaĵo el tiu ĉi ŝtofo?

Ich werde dann diesen Stoff nehmen. Wieviel wird ein Anzug aus diesem Stoff kosten?

Ĉu vi volas montri al mi kelkajn modbildojn?

Wollen Sie mir einige Modebilder zeigen?

Ĉu plaĉas al vi tiu ĉi modelo?

Gefällt Ihnen dieses Modell?

Jes, faru al mi la vestaĵon laŭ tiu ĉi modelo, sed zorgu pri tio, ke la pantalono ne estu tro mallarĝa.

Ja, machen Sie mir den Anzug nach diesem Modell hier, aber sorgen Sie dafür, dass das Beinkleid nicht zu eng wird.

[36]

Bone, Sinjoro. Mi faros laŭ via deziro. Kien mi devas sendi la vestaĵon?

Schön, mein Herr, ich werde mich nach ihren Wünschen richten. Wohin soll ich den Anzug schicken?

Mi iun sendos por ĝin preni proksiman sabaton kaj samtempe mi sendos al vi kelkajn vestojn, kiujn mi petas vin ripari.

Ich werde ihn nächsten Sonnabend abholen lassen und Ihnen gleichzeitig einige Kleidungsstücke mitschicken, die ich Sie bitte zu reparieren.

Ĝis revido, Sinjoro.

Empfehle mich, mein Herr.

F. Ĉe la horloĝisto.

F. Beim Uhrmacher.

Mi ĵus vidis en via montra fenestro beletan arĝentan poŝhorloĝon. Kiom ĝi kostas?

Ich habe da eben in Ihrem Schaufenster eine hübsche silberne Uhr gesehen. Was kostet denn die?

Pri kiu vi parolas? Pri tiu ĉi? Ĝi ne estas tre kara, mi ĝin lasus al vi por kvardek markoj.

Welche meinen Sie? Die hier? Die ist nicht sehr teuer, ich würde sie Ihnen für 40 Mark lassen.

Ne, mi ne povas elspezi tiom. Mi ĝin prenus se vi lasus ĝin por tridek kvin.

Nein, soviel kann ich nicht anlegen. Ich würde sie nehmen, wenn Sie sie mir für 35 verkaufen wollten.

Neeble, Sinjoro! Sed jen estas alia pli malkara. Ĝi kostas nur 30 markojn. Ankaŭ tre bela poŝhorloĝo. Bona meĥanismo!

Unmöglich, mein Herr! Aber hier ist eine billigere. Die kostet nur 30 Mark. Auch eine sehr schöne Uhr. Gutes Werk!

[37]

Ne, mi dankas, mi preferas la alian. Pripensu! Mi revenos morgaŭ kaj tiam vi diros al mi ĉu vi povos ĝin doni al mi por tridek kvin; mi eĉ pagus tridek sep, sed ne pli.

Nein, danke, ich ziehe die andere vor. Ueberlegen Sie sich's. Ich werde noch mal mit vorbeikommen, und dann sagen Sie mir, ob Sie sie mir für 35 geben können; ich würde sogar 37 bezahlen, aber nicht mehr.

Nu, por fari al vi servon, mi malaltigos la prezon ĝis tridek ok, sed pli malkare mi tute ne povas ĝin lasi.

Nun, um Ihnen gefällig zu sein, will ich mit dem Preis auf 38 herabgehen, billiger kann ich sie aber unmöglich lassen.

Bone, mi prenas ĝin; jen la mono.—Diru do, ĉu riparo al tiu ĉi poŝhorloĝo postulus multe da tempo?

Gut, ich nehme sie; hier ist das Geld.—Sagen Sie mal, würde eine Reparatur dieser Uhr lange dauern?

Montru, mi petas. Ne, tio ne daŭrus longe. Jam morgaŭ la riparo estus preta.

